

UNIVERSITY OF
MICHIGAN LIBRARY


Y. 30 #4

10



AMERIKA

ESPERANTISTO



F. G. G. G. G.

Sept., 1922



OFFICIAL ORGAN
of
THE ESPERANTO ASSOCIATION
of
NORTH AMERICA





NIAJ KONGRESANOJ JE TORONTO

Upper left to right:

1. F-ino Elizabeth Roberts 2. A. P. H. Rollason 3. S-ino Rollason 4. Fil-
 ineto Rollason 5. S-ino J. J. Sussmuth 6. F-ino Isabel Gordon 7. F. H.
 Sweet 8. F-ino Scheitlin 9. J. H. Pearson 10. J. W. Johnston 11. F-ino
 Kathleen Jenkins 12. B. P. Mann 13. S-ino N. Monte Gill 14. F-ino E. J.
 Meriam 15. J. J. Sussmuth 16. C. F. Bardorf 17. W. E. Baff.

Lower left to right

18. Saul J. Jaffe 19. J. F. Morton 20. F-ino Cora Butler 21. Josef Silber-
 nik 22. H. I. Keyes 23. S-ro Davis 24. D-ro J. L. Roseboom 25. Wm.
 McLaughlan 26. H. W. Hetzell 27. S-ino Ida Sorenson 28. F-ino Scheitlin
 29. S-ino Creamers 30. L. E. Creamers.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

CAMBRIDGE 38, MASS.

Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

One Dollar a Year.

Single Number 10 Cents.

Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 30

September, 1922

No. 4.

ALBANIA ACTS

Esperanto or Three Languages to Learn

The Albanian government has decreed that Esperanto be made an obligatory study in all high and commercial public schools in the land. From what we hear of Esperanto activity in Piatigorsk, Georgia, we believe that nation will soon follow suit. We thoroughly agree with the contention of P. J. Cameron in *Esperanto Triumfonta* No. 97, that it is to the small nations that we must look for the greatest aid to Esperanto. The reason is evident,—the smaller the land, the more unescapable and urgent is the need of an international—or, better, “interlingual,”— means of communication. In these same small states, too, poverty of the inhabitants requires that only one language, and that the simplest and quickest to acquire, be chosen for the role of outer-world speech. The absurdity of a three-language (French, plus German, plus English) substitute for Esperanto is glaring. In fact, in the Balkans and eastward Latin has never displaced Greek as the medium of ancient learning, and Russian, Arabic, and Italian are far more practical than French, German, and English.

If one might venture a prediction, it is that, leaving all resolutions and enthusiasms aside, Esperanto will nevertheless become by its practical and growing use the auxiliary language of all the nations from the Baltic to the Red Sea, and will spread thence, as from a constant fountainhead, into all the surrounding commercial countries. Already hardheaded business firms in Europe find that it pays to add Esperanto advertising to their advertising in the five or six

great languages. Very soon, unless all signs fail, the number of "great languages" used will be reduced. With every such reduction Esperanto's utility will move up in the scale. The process is one in which propaganda does not figure largely; practical use is all important. It falls upon us outsiders, then, to do the propaganda and defense work elsewhere, while the small nations and those who have interests in common with them lay the solid groundwork of our final victory. Here's to the small nations and to our pioniroj among them!

OUR NEW ORGANIZATION

The Congress at Helsinki adopted without dissent the accord arrived at in conference between Prof. Privat, representing the Universala Esperanto Asocio, and S-ro Chavet, representing the Centra Oficejo. The gist of that proposal only is given here; it reached our hands on the 14th, thru the medium of E. Triumfonta, no. 99.

That the official Esperantist organization be as follows:—

1. a. A permanent house of representatives, one from each of the national societies, whose vote be proportioned to the number of memberships for which it has paid dues to this **Konstanta Re prezentantaro**. This **K. R.** is to take care of reciprocal information and cooperation and of the financial maintenance of our common institutions.

b. Individual Esperantists may group internationally in the **U. E. A.**

c. Specialist societies are to centralize for propaganda and use of Esperanto in special circles.

2. The **K. R.** and the **U. E. A.** shall reach an accord as to the election of a **Centra Esperanto Komitato** of six members—holding office for three years and elected two per year. This **C. E. K.** is to guard our general interests, build up a central treasury of gifts, congress dues, dues from national societies thru the **K. R.**, and a payment from the **U. E. A.**

3. The **Lingva Komitato** is to remain independent; but national societies, the **U. E. A.**, and specialist groups may propose candidates for it.

4. The **C. E. K.** is to decide as to holding of world congresses, and is to commission a **Konstanta Kongresa Komitato**—2 representatives for **C. E. K.**, 2 local members of the past and 2 of the coming congress, also two auditors of congress accounts. World congresses are to be as heretofore, with sitting of all official committees. The official institutions are: the **L. K.**, its **Akademio**, the **K. R.**, the **U. E. A.**, the **C. E. K.** and its **K. K.**

5. Aside from the world congresses, at intervals official specialist conferences (not included in the fields of religion and politics) may be held.

6. Official communications will be published in the Esperantist magazines; official documents and reports, under charge of the **C. E. K.**, in the **Oficiala Dokumentaro**, as hitherto.

7. The present committee on organization shall in the interim before elections perform the duties of the **C. E. K.**

(The members are: S-roj Arnhold, Chavet, Isbrucker, Poncet, Privat, Stettler, Warden, and chairman Page.)

(For the present Gen. Sebert was asked to head the K. R. and S-ro Chavet to act as secretary thereof.)

The invitation of Nuremburg was accepted for the congress of 1923.

We had hopes of giving in this number a full account of the Helsinki congress, but such has not yet come to hand, and after a ten days' delay we go to press without it. Mr. Pellet by letter dated the 13th informs us that the Congress closed on Tuesday. The President of Finland and his wife received the delegates with "bountiful refreshments, tea, coffee, and music." There were 1,498 osanottajia (members) and 1,302 from 196 (localities) present, according to the Maaseudun Sanomat No. 181. The newspapers featured the congress, Uusi Suomi, No. 182, printing a full page propaganda article in Esperanto by Prof. Setälä. There were four Americans present, one being Mrs. D. E. Parrish. Mr. Pellett writes that he had a glorious time in the midnight sunlight, and journeyed almost to Petsamo, but failing to get definite news of the cross country karavano, he came back to the railroad head at Narvik.

AMENDOJ AL LA KONSTITUCIO DE USONO*

I

La Kongreso ne leĝfaru rilate oficialigon de religio, aŭ malpermesante ĉi ties liberan praktikadon; nek ĝenante la parol- aŭ presliberecon; nek la rajton de la popolo pace kunveni, kaj petskribi la Registaron por forigi plendaĵojn.

II

Ĉar bonorda milicio necesas por sekurigo de ŝtato libera, la rajton de la popolo teni kaj porti armilojn oni ne tuŝu.

III

Nenia soldato estu pacotempe loĝigata en iu domo sen konsento de la posedanto, nek militotempe krom en maniero diktota perleĝe.

IV

La rajton de la popolo esti sekura pri siaj personoj, domoj, paperaĵoj kaj havaĵoj kontraŭ maljustaj traserĉoj kaj kaptoj oni ne malrespektu, kaj mandatoj ne eldoniĝu krom laŭ versaĵna kaŭzo, apogata per juro aŭ solena aserto, kaj detale priskribantaj la lokon traserĉotan kaj la personon aŭ objektojn kaptotajn.

V

Neniu devu respondi pri mortpuna aŭ alia grava krimo krom laŭ memakuzo aŭ prodenunco akuzo de grandjuĝantaro, escepte de okazoj naskiĝantaj ĉe la ter- aŭ marfortoj, aŭ ĉe la milicio, kiam ili aktive servos en tempo de milito aŭ publika danĝero; kaj neniu devu pro unu sama delikto du fojojn endanĝerigi korpe; nek devu en krimproceso atesti kontraŭ si mem, nek estu senigata je vivo, libereco, aŭ proprajo sen orda proceduro; nek privatan proprajon oni utiligu publike sen justa kompenso.

VI

En ĉiuj krimprocesoj la akuzato ĝuu la rajton al baldaŭa kaj publika juĝado, per senpartia juĝantaro el la Stato kaj distrikto kie la krimo estos plenumita, kiu distrikto estos antaŭe difinita perleĝe; kaj esti informata pri la naturo kaj kaŭzo de l' akuzo; renkontiĝi kun la kontraŭ li atestantoj; havi devigan procedon por ricevi favorajn por li atestantojn, kaj havi advokatan helpon por sia defendo.

VII

En procesoj de komuna juro, kie la valoro pridisputata superos kvardek spesmilojn, la rajto de juĝado per juĝantaro estu konservata, kaj nenia afero juĝita de juĝantaro estu alie reesplorata en iu ajn Kortumo de Usono, ol laŭ la reguloj de la komuna juro.

VIII

Troan kaŭcion oni ne postulu, nek troajn monpunojn aljuĝu, nek kruelajn kaj nekutimajn punojn plenumu.

IX

Sub tio, ke la Konstitucio iujn rajtojn elnomas, oni ne komprenu, ke ĝi neas aŭ malestimigas aliajn, retenatajn de la popolo.

X

La povoj ne delegitaj al Usono per la Konstitucio, nek malpermesita per ĝi al la Statoj, estas rezervataj ĉe la Statoj respektive, aŭ ĉe la popolo.

XI

La juĝan povon de Usono oni ne komprenu kiel ampleksantan kiam ajn proceson de komuna juro aŭ ĉe ŝtatkuratoro, komencitan aŭ faratan kontraŭ unu el le Usonaj Statoj de civitanoj de Stato alia, aŭ de civitanoj aŭ regatoj de Stato alilanda.

(Daŭrigota)

* Por traduko de la Konstitucio mem vidu la numerojn de Oktobro, Decembro, 1917, kaj Januaro, 1918.

H. M. S.

LA ĈIFONOJ DE AMO

Petro aprobis, vidante sian fianĉinon, Marta, en akompano de la muzikisto Felix. "Kial mi elspezu monon kaj tempcn por distri la knabinon? Ŝi havu da plezuroj laŭvole, dum mi laboras por ke ni povu edziĝi." Tiel opiniis Petro, serioza kaj praktika knabo de Granita Stato, penante kaj pensante por la tempo morgaŭa.

Diris al ŝi la gepatroj de Marta, du-tri fojojn ĉiutage: "Ĝestos feliĉa horo, kiam vi fariĝos edzino de tia saĝulo kia Petro. Jen brava junulo, Petro! Petro estas ĉio kion fianĉino povas deziri en estonta edzo; dume Felix estas revemulo, sen okupo deca al viro, sen ia ambicio igi sin alia ol li estas. Forgesu lin; pensu sole pri Petro."

Marta estis obeema knabino. Ŝi bone sciis ke ili parolas la veron, kaj konsilas nure por ŝia feliĉo. Ŝi firme decidigis resti fidela al la promeso al Petro kaj tial, sciante ke ne estas ia danĝero en tio, daŭrigis danci kun Felix ĉe publikaj parkoj; permesi ke li remu ŝin en boato dum li kantas, kaj aĉetu por ŝi multe da kremglaciaĵo kaj kando. Vespere Felix ludis en loka teatra orkestro, kaj tiam estis la horo de la, laŭ la gepatroj, ideala fianĉo Petro.

Sidante malproksime de Marta, sur perono de ŝia humila hejmo, Petro tiam regaligis ŝin per la okazoj en la spicejo kie li laboris; kaj rememorigis ke li igos ŝin sia edzino post kiam li gajnos sekuran pozicion, sufiĉe da mono. . . . post du aŭ tri jaroj.

Dimanĉe la du junuloj ofte sidis samtempe apud Marta sur ties perono, Petro parolanta pri la vivrimedoj; Felix parolante pri vantaĵoj, pri l' odoro de la floroj, ekzemple.

"Vidu la sunsubiron, glorplena jen ĉielo! Koloro estas beleco! Kaj tia kia vi, Marta, donas koloron al la vivo de viro," . . . specimeno de Felix.

"La prezo de brasikoj malsupreniras, kaj de manĝaĵoj ĝenerale. Ne estos tiom multekoste por du, vivantaj kune," . . . de Petro.

Oni jam divenas ke Marta eventuale estis edziniĝonta kun Felix. Sed Petro, kiam li aŭdis pri tia por li katastrofo ne povis kredi. Li telefonis al la gepatra domo de Marta. Respondis ŝi mem.

"Vi ne amas tiun muzikiston, Marta," asertis Petro, serene, "Kiel vi povus ami viron kiu ne kapablas provizi por vi konvenan hejmon, aŭ gardi vin kontraŭ malsato estonta? Oni neniam pagos multe al Felix por lia trombona bruado. Li estas kaj estos senhava sentaŭgulo. Tamen rondiras la famo ke vi edziniĝos kun li. Pro tio de nun malpermesite estas ke vi vidu lin plu. Vi fariĝis jam sufiĉe aĝa por esti dignoplena, kiel decas al mia fianĉino. Sufiĉe longe vi rajdadis la karuselon de knabina malsaĝeco. Post du aŭ tri jaroj. . . ."

"Sed mi estas la koloro de la vivo por Felix," sopiris Marta tra la ferfadeno.

"Ha! li inokulas al vi sian frenezajn ideojn! Kiel vi. . . . ies koloro? Sensencaĵo!"

"Sed li estas tiom bona. . . ."

"Ĉar li aĉetas bombonojn por vi? elspezante ĉian moneron el la poŝo, kiam li posedas nenian aliloke? Tre bona nun, jes ja. Sed mi, fraŭlino, ŝparas por la necesajoj de via estonteco; mi ne agas kiel senpripensulo."

"Felix por mi donas ĉion sen penso pri io ajn, ĉar mi estas ĉio ĉe li. Kaj por mi, Sinjoro Viro, bombono hodiaŭ estas pli ol brasiko. . . post du aŭ tri jaroj. Krome, mi enamiĝis je Felix. La famo estas la vero."

* * * * *

—Daŭrigota—

PAROLEJO

En sed ne pri Esperanto | ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulataj
In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and address required

(The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head; the facts are on the authority of the person signing. NOT open for any articles upon Esperanto subjects proper.)

INTERNACIA MONDLITERATURO

por la tutmonda Esperantistaro

Kion ni devas legi? Estas certe, ke ĉiu, iomete progresinte rilate la lernadon de 'nia lingvo' bezonas la legadon de internacia literaturo, ne tradukaĵojn el sia nacia literaturo. Nia principo ja estas: Kun niaj samnaciaĵoj ni parolu la gepatran lingvon; kun alilandanoj Esp-

eranton, la neŭtralan mondhelplingvon! Do, jam pro tio neniu volonte legos la verkojn de sia nacia literaturo Esperantigitajn.

Legante la verkojn de alinacianoj ni enpenetros en la literaturon, kulturon, kutimojn, movojn, vivon de aliaj popoloj.

Dum la Geneva konferenco mi jam publike—kaj konsentite de ĉiuj ĉeestantoj— aludis la necesecon, krei entreprenon, per kiu ni povas ricevi por niaj kursoj, por niaj lernejoj, por niaj propraj liberaj horoj la plej bonajn verkojn de aliaj nacioj, bone Esperantigitajn.

Bedaŭrinde la fame konata firmao Hachette & Cie. en Paris ne plu eldonas Esperantajojn. Des pli salutinde estas la fakto, ke unu de la plej grandaj Germanaj eldonejoj, la firmao Hirt kaj filo en Leipzig, montras grandan intereson por nia movado; ĝi jam eldonis bonajn Esperantajojn kaj ĝi jam antaŭ kelkaj monatoj konsentis mian planon, krei specialan fakon por “Internacia Mondliteraturo.”

Mi proponis jenajn principojn:

1. Oni akceptu nur verkojn, kiuj estas vere valoraj de sur literatura vidpunkto! Ĉu iu verko estas tia, pri tio decidu la samnacionoj mem de la elektota verkisto.
2. Oni komisiu la tradukon de iu ajn verko nur al ano de la sama nacio, al kies literaturo la verko apartenas!
3. Oni zorgu, ke kiel eble plej multaj—se eble ĉiuj civilizitaj— nacioj estu reprezentataj en la entrepreno de “Internacia Mondliteraturo”!
4. Oni komence elektu—por atingi la celon de la 3a punkto—ne tro longajn verkojn!
5. Oni eldonu en unu volumon nur verkojn de unu aŭtoro kaj nomu la volumon laŭ li! ne laŭ la tradukinto, kio ŝajnas al mi tre malaprobinda kutimo.
6. Oni komence entreprenu ne tro multon! t. e., oni ne traduku ĉiuspecajn verkojn, sed—tion mi proponas pro unua stato de nia movado—nur beletristikajn verkojn, ekz. novelojn, rakontojn, mallongajn romanojn, k. c. Pli malfrue oni ja povas decidi pri la traduko de, ekz., ĉiuspecaj sciencaj verkoj, k. a.

La firmao Hirt kaj filo komisiis min, kiel direktoron de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, zorgi pri la efektivigo de la ideo de “Internacia Mondliteraturo” por la tutmonda Esperantistaro.

Mi ĝojus, se mi baldaŭ ricevus respondojn, ĉu samideanoj el ĉiuj negermanaj nacioj volas helpi, por ke ni ricevu el ĉiu popolo kaj ĉiu literaturo valorajn verkojn Esperantigitajn, taŭgajn por nia celo. Komprenoble la firmao laŭdece rekompencos la laboron de la tradukantoj.

Mi petas, ke ĉiuj, kiuj volas partopreni al nia laboro, nepre necesa por la Esperantistaro, anoncu sian nomon kaj samtempe skribu, kion ili volas traduki. Estas plue rekomendinde, ke ili (se ili ne jam estas konataj kiel lertaj tradukistoj kaj Esperanto-stilistoj) poste sendu parton de sia tradukaĵo, laŭ kiu oni povas juĝi pri ilia lerteco; ĉar ni povas akcepti nur bonajn tradukojn. Sed certe en ĉiu nacio troviĝos sufiĉe da tiaj tradukistoj. Ĝis nun ni jam ricevis promesojn de kunlaborantoj el diversaj landoj. Helpu, por ke ni baldaŭ havu

vere "internacian" kolekton, kolekton reprezentantan ĉiujn naciojn.
 Profesoro D-ro Dietterle,
 direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

LA KVARA SKOLTA LEĜO

Tiu kiu amplekse esploris la kaŭzojn de la pasintaj internaciaj, eĉ naciaj, polemikoj kaj diferencoj sendube venas al la konkludo ke en plej multaj okazoj la ĉefa kaŭzo estis ĉiam la manko de toleremo, kunligita kun la malkompreno de la vidpunkto de la alia flanko; aŭ, unuvorte, la manko de la spirito de frateco.

Speciale al la Esperantistaro tiu kaŭzo estas tute komprenebla, tial, tio, kion mi skribas nun devas interesi ilin.

La fondinto de la Skolta Movado, Lia Kavalira Moŝto Baden-Powell, klare komprenis ke se la popoloj de la Mondo iam vivos en "sankta harmonio" oni devas eduki la nunajn generaciojn en la spirito de **Frateco**. Plene kompreninte la signifon de tiu fakto, li saĝe bazis la Skoltan Movadon sur la spirito de Frateco kaj la Brita kvara skolta leĝo tial diras ke "Skolto estas frato de ĉiu alia skolto, ne gravas al kiu socia rango la alia apartenas."

En la edukado de knaboskolto tiu kvara leĝo ludas tre gravan rolon kaj preskaŭ ĉiuj skoltaj praktikoj celas admoninstrui tiun spiriton de frateco.

Por skolto estas sia devo esti frato al ĉiu alia skolto sed kiam li renkontas skolton el alia fremda lando tuj evidentiĝas la lingvo-malfacilaĵo kaj eniras lian kapon la penso "kiel mi povas esti frato al mia fremda fratskolto se mi ne scias paroli lian lingvon?" Se tiu renkontito estas franco eble la kanadano (ekzemple) scias paroli la francan lingvon, sed kiam li renkontas skoltojn el Francujo, Hispanujo, Rusujo, ktp., li nur povas paroli kun kaj kompreni tiujn kiuj parolas la anglan aŭ francan lingvon. Kaj tiam en lia simpla maniero li ekkomprenas la neceson de komuna help-lingvo.

Jen, miaj amikoj, gesamideanoj, estas fruktopromesa grundo kiu devus esti kulturita de vi.

Stariĝis antaŭ tri jaroj, en Londono, la Skolta Esperantista Ligo, kies Propaganda Fakestro la verkinto de ĉi-tiu artikolo estas. En tre multaj landoj ni elektas Naciajn Agentojn kaj nia ĉefa celo estas la disvastigado de Esperanto inter la geknaboskoltaro de la Mondo. Mi estas preta kunlabori kun ĉiuj kiuj povas helpi al ni. Ni bezonas spertajn Esperantistojn en ĉiuj partoj de la Mondo kiuj estas pretaj stariĝi klasojn por geskoltoj. La estroj de trupoj ne serĉos por instruantoj ĝuste pro tio ke ili jam havas sufiĉan laboron por fari en aliaj direktoj, tamen mi estas certa ke ili volonte permesus eksterulojn instrui siajn trupanojn pri Esperanto. Se mia sugesto ĉi-supra allogas vin, bonvole skribu al mi por pludiskuti ĝin kaj aranĝi detalojn. Mi povas konatigi al vi niajn Naciajn Agentojn kiuj helpos al vi laŭeble. Mi plezure donos pliajn detalojn pri nia Ligo al ĉiuj kiuj volas reciproke helpi al ni kaj al la Esperanta movado. Jen mia adreso:

27, Lea Bridge Road, Leyton, Londono, E 10, Anglujo.

J. W. Leslie, Propaganda Fakestro, S. E. L.

GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

La vera gvidstelo de la homo

Dio donis **intelekton** al ĉiu el vi, por ke vi ĝin eduku al kono de Lia Leĝo. Hodiaŭ, la mizero, la eraroj enradikitaj de jarcentoj, kaj la volo de viaj mastroj eĉ kontraŭas al vi ĝian edukeblecon; kaj pro tio al vi necesas renversi per forto tiajn barojn. Sed eĉ kiam la baroj estos renversitaj, via propra intelekto ne sufiĉos por ke vi konu la Dian leĝon, se ne vin apogante al la intelekto de la homaro. Via vivo estas mallonga: viaj individuaj kapabloj estas malfortaj, malfirmaj kaj bezonas apogan punkton. Nu, Dio metis apud vi estaĵon, kies vivo estas daŭra, kies kapabloj estas la sumo de ĉiuj individuaj kapabloj, kiuj eble de 400 jarcentoj ekzercigadas; estaĵon kiu tra eraroj kaj kulpoj individuaj ĉiam pliboniĝas, laŭ scio kaj moralo; estaĵon ĉe kies disvolvigo Dio ĉiuepoke skribis kaj skribas linion pri Sia leĝo.

Ĉi-tiu estaĵo estas la homaro.

La **Homaro**, diris pensulo de l' pasinta jarcento, estas **homo ĉiam lernanta**. La individuoj mortas; sed la tiomo da vero de ili pensita, la tiomo da bono de ili farita, ne perdiĝas kun ili. La homaro ĝin kolektas, kaj la homoj promenantaj sur ilia tombo ĝin profitas. Ĉiu el ni naskiĝas hodiaŭ en atmosfero de ideoj kaj kredoj, ellaborita de la tuta antaŭa homaro: ĉiu el ni alportas, eĉ ne sciante, elementon pli aŭ malpli gravan al vivo de l' homaro postvenonta. La edukiteco de la homaro progresas tiel same, kiel oni starigas, en Oriento, tiujn piramidojn al kiuj ĉiu pasanto aldonas ŝtonon. Ni pasas, unutagaj pasantoj vokitaj por plenumi aliloke nian individuan edukitecon: la edukiteco de la Homaro montriĝas fulmete en ĉiu el ni; senŝualiĝas malrapide, progrese kaj daŭre en la Homaro. La homaro estas vivanta Parolo de Dio. La Dia spirito ĝin fekundigas, kaj ĝi elmontriĝas ĉiam pli pura, ĉiam pli agema de epoko al epoko, ian tagon pere de individuo, alian tagon pere de popolo. Je laboro post laboro, je kredo post kredo, la Homaro akiras pli kaj pli klaran nocion pri sia vivo, pri sia misio, pri Dio kaj Lia leĝo.

Dio korpigiĝas sinsekve en la Homaro. La Dia leĝo estas unuobla, same kiel Dio; sed ni ĝin malkovras laŭ artikolo, laŭ linio post linio, ju pli amasiĝas la edukiga sperto de la sinsekvaj generacioj, des pli kreskiĝas laŭ vasteco kaj denseco la **asocio** inter la rasoj, inter la popoloj, inter la individuoj. Neniu homo, neniu popolo, neniu jarcento povas pretendi ĝin eltrovi en ĝia tuteco. La moralan leĝon, la tutan leĝon pri vivo de la homaro povas nur eltrovi la tuthomaro kunigita asocie, kiam ĉiuj fortoj, ĉiuj kapabloj kiuj konsistigas la homan naturon estas disvolvigitaj kaj agantaj. Sed intertempe tiu parto de la homaro pli progresinta en la edukiteco instruas al ni per sia disvolvigo parton da leĝo kiun ni serĉas. En ĝia historio ni legas la Dian planon, en ĝiaj bezonoj niajn **devojn**; devoj ŝanĝiĝantaj aŭ pli bone dirite kreskantaj kun la bezonoj, ĉar nia unua devo estas kunlabori por ke la Homaro atingu baldaŭ tiun plibonigitan kaj edukitecan gradon, al kiu Dio kaj la tempoj preparis ĝin.

El "La Devoj de la Homo," de Giuseppe Mazzini, tradukis Mikaelo Arabeno.

FOR THE STUDENT

Man's True Guiding Star

God has given each of you an **intellect** that you may train it to a knowledge of His Law. Today, the misery, the deep-rooted mistakes of centuries, and the will of your masters actually oppose the possibility of educating it; and it is therefore necessary for you forceably to overthrow such obstacles. But even when the obstacles shall have been overthrown, your individual intellect will not suffice that you may know Divine law, unless you lean upon the intellect of humanity. Your life is short: your individual capacities are weak, unstable, and need a point of support. Now God has set beside you a being whose life is lasting, whose capacities are the sum of all individual capacities, which have undergone exercise for perhaps four hundred centuries; a being which thru individual mistakes and faults is ever improving in knowledge and morality; a being in whose development God has in every age written and is writing line upon line of his law.

This being is Humanity.

"Humanity," said a thinker of the past century, "is **man ever learning**." Individuals die; but the quota of truth by them thought, the quota of good by them done, is not lost with them. Humanity culls it, and men walking over their tomb take advantage of it. Each of us is born this day in an atmosphere of ideas and creeds elaborated by all previous humanity: each of us contributes, tho unconsciously, an element of greater or less importance to Humanity of the future. The education of mankind advances in the same way as, in the East, they erect those pyramids to which each passer-by adds a stone. We pass by, travellers of a day, called to complete elsewhere our individual education: the education of mankind is seen by glimpses in each of us; is unveiled slowly, progressively, and permanently in Mankind. Humanity is a living Word of God. The Divine spirit fertilizes it, and it is revealed ever purer, ever more active from age to age, — one day thru the medium of an individual, another day thru the medium of a people. Work by work, creed by creed, Humanity acquires a clearer and clearer notion of its life, of its mission, of God and His law.

God is incarnated successively in Mankind. The Divine law is single, just like God; but we discover it article by article, line after line; the more accumulates the educative experience of successive generations, the more grows in extent and density **association** among races, among peoples, among individuals. No one man, no one people, no one century can claim to discover it as a whole. The moral law, the entire law of human life can be discovered only by the entire human race in association, when all the forces, all the capacities which comprise human nature are developed and in action. But meanwhile that part of mankind which has most advanced in education teaches us by its development a part of the law we are seeking. In its history we read the Divine plan, in its needs our **duties**; duties changing, or rather, growing with the needs, for our first duty

is to work together that Humanity may soon reach that degree of improvement and education for which God and the times have prepared it.

Translated from the Italian by an Italian.

* * * * *

Notes

Giuseppe Mazzini, the original author of the above selection, was born in Genoa June 22, 1805. Entering the law in 1817, he took up cases for poor clients, wrote magazine articles and pamphlets on political, social, and economic questions, and founded two secret societies and other institutions of a revolutionary and educational character. On these accounts the governments of the then various Italian states combined to imprison him, exile him, and finally condemn him to death should he return to Italy. So he was ever on the move, spreading his doctrines from country to country, driven about and shadowed by the police of all Europe. Risking execution he made several visits to his dismembered fatherland, and with a vision not only of a United Italy but of a European Federation of free nations, he died under an English name in Pisa, March 10, 1872.

His "Duties of Man," from which our selection is taken, is a work of interest not merely to Italians of that time, but to world citizens of the present day. With this idea in view the Workers' Esperanto Group of Genoa have recently published it for free distribution on the occasion of the fiftieth anniversary of the Genoan called by his fellow-citizens the "Prophet of Italy" and "Apostle of Mankind."

intelekto: a word as yet unofficialized, defined by Kabe as "kapablo pensi." It bears the same relation to the official word **menso** that "intellect" does to "mind." ..**kono**: later on we have **scio**: the noun forms of these words mean practically the same thing; tho **koni**, the verb, is used mostly with persons, **scii** with things. ..**enradikita kontraŭas**: it is a growing tendency of modern Esperanto to shorten up words (a couple of decades ago **enradikigita** and **kontraŭstaras** would probably have been used). — **Nu** with comma commonly = Eng. argumentative "now." — **ekzerciĝadas**: dist. **ekzerci** from **praktiki**, the former meaning "practice" which makes perfect, the latter "practice" of one's profession or trade: e. g., **oni ekzercas la korpon, but oni praktikas sian profesion**.

la tiomo, lit. "the 'so much.'" — **fulmete**, lit. "by little (lightning) flashes." — **Parolo** means practically the same as **Vorto**, as used in the Nova Testamento. — **fekundigas**: **fekunda**, an unofficial word, is defined by Verax as "kiu povas reprodukti." — **pere de**: simply a more emphatic form of **per**. — **Je laboro post laboro**, etc.: the prepositional idea is so exceedingly indefinite that **je** is properly used. — **nocio**: a neologism, defined by Boirac as "ekkono, komprenajo." It means practically the same as **ideo**.

korpiĝas: a stickler for "logic" would have lengthened it into **enkorpiĝas**. — **artikolo**: the use of this word for an "article" in a constitution or code et sim. is recent. — **edukiga**..**kreskiĝas**: both suffixes seem superfluous. — **tuthomaro**: it is a growing tendency

to combine adjectives in one word with their nouns, especially if the connection is intimate or euphony is promoted (e. g. **tutmondo** (really one idea), **Nord-Ameriko**). —**intertempe**: simpler is the Fundamento word **dume**.

Two corrections: In our Notes to the Gem in the May number it was stated that the original shade of meaning of **historio** is "history." As a matter of fact it is "story." (Ekz. 10,6; 18,6.) Again, in the Applicational Exercise, in the sentences beginning "I don't care" the "idiomatic" equivalent (which we unaccountably forgot) is **estas egale al mi**. — F. K. 64, 132, etc.

Herbert M. Scott.

PLEJ BONA TRADUKO DE LA LASTA EKZERCO

La plej alta digo en la mondo* estas la 'Arrowrock Dam' ĉe Boise, Ida.,* masiva arkforma* ponto de solida betono, kun pezo de pli ol miliono da tunoj, kiu sin levas ĝis la alteco de tricent kvindek unu futoj inter montoj de altaĵo* de unu milo.* Ĝi estis konstruata* en la daŭro de kvar jaroj je kosto de kvin milionoj da dolaroj. Kiam pleniĝas la artefarita monta lago malantaŭ la digo, ĝi superversigas kanjonon profunde de ducent futoj laŭlonge dekok miloj.* La digo estis konstruita de la Usona Regajna Servo, kiel grandega superakvuma projekto.*

Mrs. Alice Wicks, Vancouver, B. C.

* * * * *

Sugestiaj Notoj

'Sur la ter(glob)o' estus la ĝusta esprimo; 'mondo' pravè rilatas al la homaro. Idaho, prefere ne mallongigu ne monde konataj nomoj. —'arka' sufiĉas. — 'alteco,' aŭ nur 'alto,' aŭ 'montaj altaĵoj.' — mejlo. — 'oni konstruis ĝin,' aŭ 'ĝi konstruiĝis' estus pli internacia. — prefere uzu 'mejlojn,' aŭ 'laŭlonge je'; aŭ, 'laŭlonge de.' — "La digon konstruis la Usona (Ter)regajna Servo(fako)"; aŭ nur, sentraduke, "Reclamation Service" — kiel grandegan (super)akvuman projekton." Ne ŝangu la tempon de 'estis konstruata' al 'estis konstruita.'

TO TRANSLATE

I believe it would be wise to include Esperanto in our school curricula, preceding the study of **any other** language. It is a natural stepping stone, rendering the acquisition of either French or Latin easier, and giving the pupil a valuable acquisition besides. I am thoroughly convinced that if the schools in about the eighth grammar grade were to study Esperanto one year, the results would be beyond our expectations or our dreams. I think such study will come in the not distant future. Meanwhile those schools which undertake it first will have the satisfaction of being pioneers instead of trailers.

Patro: "Por kiu rezono vi deziras edziĝi kun mia filino?"

Junulo: "Mi ne havas rezonon, sinjoro, mi ŝin amas."

London Opinion.

NORDAMERIKA KRONIKO

Boone, Iowa—Samideano G. H. Gibbons transloĝigis al Gospel Misiista Unuiĝo, 1841 VIIth St., Kansas City, Mo.

Westmount, Quebec, Can.—Al gesinjoroj P. L. Pratley naskiĝis filo la 25an de aŭgusto.

Boston, Mass.—La societo kunvenas konstante ĉiusemajne dum la somero, kvankam multaj samideanoj estas disvastigintaj sin en libertempejojn. Sekr. Marutian malsaniĝis kaj devis pasigi tri semajnojn en hospitalo Peter Bent Brigham por ekssoldatoj, kie li propagandis. Prez Lee transloĝigis al Concord, Mass.. D-ro D. O. S. Lowell, L.K., paroladis pri Esperanto per Radio aŭguston la 14an je Medford Hillside. La 5an de Oktobro je la 8a horo vespere li ree parolados tie. La kutima barĉo okazos la kvinan sabaton de la monato posttagmeze kaj vespere ĉe Samideano s-ino Sammett, 20 Chestnut St., Malden.

St. Louis, Mo.—Grupo de ses lernantoj kunvenas ĉiumarde vespere je 5225 Theodosia Av., kondukata de G. M. Burkarth, U. E. A. del.

Fairview, N. J.—La Hudson County Esperanto Societo kaj la "Harmonio" grupo de Novjorko okazigis komunan piknikon aŭg. 20. je Indian Grove. Ĉirkaŭ 100 ĉeestis kaj pro la sukceso oni decidis ripeti ĉiun jaron. Orhestro provizis muzikon, kaj en diversaj konkursoj oni premiis la gajnantojn per multvaloraj premioj. Parto el la gajno oni metis en fondon retenotan por la nacia kongreso kiu okazos en Hudson County venontan jaron. Laŭokaze la tago estis soleno de la 23a Esperantistaĝa jartago de prez. Sussmuth.

Hudson County, N. J.—Junio la 21an la H. C. E. Societo festis la finon de elementa kurso per festeno je Maxim's Restaurant, Union Hill, N. J. Salutis la gastojn Prez. J. J. Susmuth kaj ŝekve paroladis s-roj Sayers kaj Klačin. La kursanoj deklamis, kaj oni kantis ankaŭ. La lernintoj estis H. Schlichtel, A. Schlichtel, f-ino Minne Schlichtel, E. Walvogel, J. J. Lipoti, J. Federer, f-inoj H. Seeman, M. Frank, kaj L. Tanz, kaj s-ino Wm. Messmer. Post la festeno kaj programo oni dancadis. La progresintoj kunvenas en literatura klaso ĉiun duan semajnon.

New York, N. Y.—Junio la 10an okazis barĉo de Harmonio, kiun ĉeestis 50. Paroladis, kantis, deklamis, kaj pianludis diversaj samideanoj, inter kiuj: f-ino Dorf, s-ro Klačin, s-ro Morton, prof-o Brunoff, f-ineto Gascon-Ferrer, f-ino Bekema—holanda gasto—, s-roj Sussmuth, Baltistiĉ, Saville, Goldwag, Sayers, kaj Bortnik.*

*Owing to the late receipt of this news and the fact that the copy received, as sent, last month was returned from the printer's correctly marked "illegible," we here give only a summary. Please remember that life is short and typewriter ribbons are fading.

Newark, N. J. Amrad—J. D. Sayers parolados Okt. 8, 8.50 P. M.

Antaŭpreni la postularon—Oni proponas ke la profitegemuloj kaj la amasigemuloj estu mortpunataj; nun, do, estas bona okazo ke ili amasu ĉerkojn por povi profitegi de la postulado.—Simplicissimus (Munich).

OFFICE NOTES

By authority of the Executive Committee a second call of 25 per cent was made on the Guarantee Fund August 31st.

If any samideanoj wish to know particulars regarding this Fund, which is for the purpose of taking care of Association expenses not covered by membership and subscriptions to the Magazine, we shall be glad to answer inquiries. Further subscriptions to this fund are very much needed. Are you a **Guarantor**? If not, let us add your name to the list.

In the list of "Samideanoj buying tickets or otherwise contributing to the Congress at Toronto," (p. 12), the two following names were omitted:

J. D. Hailman, Pittsburgh, Penna.

H. W. Hetzel, Philadelphia, Penna.

Miss Cora Butler, President of the New York Esperanto Society, has the sympathy of samideanoj in the sudden death of her mother.

 EKSTERLANDA KRONIKO

Doctor Shimonek of Chicago was a member of the notable Rumanian Esperanto Congress at Cluj, which turned out to be a veritable international congress, owing to the presence of many samideanoj from Hungary, Germany, Russia, and Bulgaria. The congress was a great success not only as a demonstration of Esperanto, but as an aid to greater friendliness between the Balkan peoples. All the magazines of the land took notice, some with special reports and articles in Esperanto. The queen, and the ministers of arts and science, and of public instruction sent greetings. Dr. Shimonek was last heard from en route for the Black Sea region, but was awaiting developments regarding the cholera situation.

According to Brazila Esperantisto, f-ino L. S. Holsapple, well known among American Bahaj and Esperantists, is conducting an Esperanto course and gives a talk each Wednesday about the Bahaj doctrine, in the rooms of the Estrella do Oriente, S. Salvador, Bahia, Brazil.

The Geneva Manifesto to teachers has now been translated and published in eight or more languages. The translations make an interesting collection.

The Bolivian Esperanto Association was founded June 10th at Oruro, Bolivia. Salutoj, Samideanoj!

An Esperanto course is being conducted at the Police Headquarters of Rio de Janiero to prepare policemen to help foreign visitors at the national Centenary Exposition.

China is showing notable activity; a Sunday course for beginners at the French concession in Shang haj with 44 students is reported. In Wu sung at the Chinese public school is a Sunday course with 40 pupils. At Pekin University—a free student body after the style of mediaeval universities—we believe—samideano Eroshenko, the blind Bahaj enthusiast, is helping in an Esperanto course with

251 students. In Kwang tung all schools are reported to have put in Esperanto.

Verda Ombro of Formosa is translating Hamlet into Japanese from the Esperanto version in parallel column.

The Informa Bulteno of Barcelona gives the list of delegates to the Geneva Conference in full.

Les Petits Bonhommes, a 10,000 issue children's weekly of Paris has decided to print an Esperanto course.

An Esperanto column is appearing weekly in the Shin-aichi of Nagoja, Japan. In the July 6th issue began a history of the Esperanto movement in Japanese.

PRESS MENTION

New York World, May 28—Esperanto Next, Sequence to Radiography—in which Prof. Christen said:

"With Esperanto we shall hear lectures by men of science and literature without having to bring them from their own countries to speak to us in broken English. They will speak at home and we shall hear them in America. The League of Nations is discussing the advisability of adopting Esperanto, and if it does so—as I expect it will in the fall—Esperanto will be taught in the schools thruout the world.

"If people had been speaking a common language there would have been no war. Think of the troubles that were caused by the diplomats who were forever discussing what the others meant and coming to no agreement. But even if war had broken out, many lives would have been saved. There would have been fewer massacres. People were massacred because they were 'foreigners' and despised on that account. When men speak the same tongue they cannot regard one another as foreigners. That is why a war between America and Great Britain is unthinkable."

Skandinaviska Good Templaren, Worcester, Mass., June issue, contains a Swedish translation of the Geneva Manifesto.

The Palestiner, Detroit, Mich., Sept. issue, has a full page article "Discussing the Universal Language," by Robert L. Clegg.

The Bayonne Times, N.J., Aug. 19—Aunt Julia sez: Esperanto iz no moar an ahrtifishal langgwej than an omlet iz an ahrtifishal fuud.

RECENZA FAKO

Rakontoj el la Biblio, Zamenhof, 80pp., 1s. 5d., B.E.A. reprints from British Esperantist; a foretaste of the complete Old Testament now undergoing revision by the Bible Committee.

La Karavano, Hauff, Eggleton, 10 pp., 2 ed., 1s. 8d. at B. E. A.—A vivid story containing a number of fables after the fashion of the Arabian Nights.

La Formortinta Amiko, Thiebault, Grosjean-Maupin, 30 pp., ?, E.C.L., 51, rue de Clichy, Paris, France—Not content with regaling us with scientific ghost-stories, this book actually carries a photograph of one, excellent Esperanto, well printed.

Aŭtomata Muziknotado, Cogen, 8pp., 2 RK at Belga Esperantisto, 45 Kleine Beerstraat, Antwerpen, Belgium—A technical work of merit and learning. The historical account begins in antiquity; music notation systems evolved gradually before printing. The present customary notation uses diatonic notation (sharps and flats) to express the entire chromatic (12 note) scale. The proposed notation—that of Hautstont—is of 12 note positions on a three line scale.

Ama Stelaro, 'La Forgesito,' 119 pp., 27M at O. Ziegler & Ko., Marktredwitz, Bayern, Germany—A collection of short plays, stories, and verses in excellent Esperanto, well printed.

La Unua Ondo, 16 pages of excellent verse from Libera Torento, Saratov, Russia, issued at 50 kopecks, well printed.

La Luksdometo, Meilhac et Halevy, Fauvart-Bastoul, 62 rue Chabot Charny Dijon Cote d'Or, Autry le Chatel, Loiret, France, 50 pp., 3.5 fr. from the author—A play in good Esperanto, well printed.

Ivanov Paŭlo, Varankin, 19 pp., 5000 R., V. Varankin, 53 Studjonaja, Nizhni Novgorod, Russia—A fantastic operatic sketch of the terrible school examinations. With dancing and music this might make a very successful presentation for an Esperanto class. There are numerous press errors.

La Kantistino, Hauff, Wuster, 62 pp., 11.25M. at Esperanto Verlag, Berlin S59, Germany—A well printed attractive story.

EDITORIAL MEDITATIONS

The present number is hardly what we wished it to be. We have put off compiling the copy until the last possible hour for several reasons:

1. We had hoped to get a sufficient account of the Helsinki congress to make this a congress number.
2. We have been working upon a textbook for Spoken Esperanto which has consumed much of our energy during the summer months and which is now in press.
3. We have expected day by day to be relieved from the editorship, and did not wish to complicate the work of a successor.

The address of the magazine is as yet Cambridge 38, Mass., any alterations thereof being unauthorized. We assume no responsibility for matter not sent to this address. We do not take subscriptions or book orders, which should be sent to the E. A. N. A. headquarters.

While this month's copy includes items received up to the 12th of September, hereafter no items from any source will be printed if not in our hands by or before the first of the month. (death and taxes of course excepted).

Interŝanĝantaj gazetoj bonvole notu. Ne ekzistas Esperantejo en West Newton, krom presejo; nia adreso redakcia, Cambridge 38.

—START A CLASS—TRY THIS—
WHAT Shall I Sell Them?

—!PROPAGANDA PACKETS!—

A grammar; a dictionary; a story to read; information about Esperanto; and another piece of literature—a \$0.50 combination; four for \$1.00
STRIKE WHILE THE IRON IS HOT—A CLASS THEN AND THERE

MISERERE (Wagnalls) kaj THAIS (France) Po \$0.50.

La ROZUJO ĈIUMILJARA (Wagnalls)

La AKROBATO de Nia Sinjorino

BLANCHE, la Virgulino de Lille (Schubin)

MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo
dum la Milito (Giesy)

Po \$.35.

La unuaj eldonadoj tradukitaj de
S-RO EDWARD S. PAYSON

Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko
Aĉetebblaj ĉe la Esperanto Office,

Po \$0.35

Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

S-ro Pedro Juarez Cano, Box 148, Santa Clara, Cuba. I.P.K., P.M.

Mrs. Derry, 156 Douglas Rd., Acocks Green, Birmingham, England, d. k. kun Boston aŭ Usono.

S-ro Jan Merta, Forberk 5, Wamberg, Ĉekoslovakia.

Oklahoma City, Okla. (Usono) Grupo. I.P.K., L. Sin turnu al R. E. Dooley, 527 North Durland.

S-ro Elmer Nicholas, Miller, Missouri, P.M., I. P. K., letejoj pri historio, arkeologio, scienco.

S-ro Aleksandro Trahterov, Harjovskaja 32, Bahmut, Loncea gub. Ukrainia, Eŭropo. L. P. I.

S-ino Petro Zivulin, Ruslando, Astrahan, 3uĉ. Kazanskaja, 8: i.p.k., fotografiŝto, pri ĉiuj temoj kaj demandoj.

S-ro Boriso Dzetoveckij, Kazanskaja ul. 71, Astrahan, Ruslando, L. seriozaj, de k. pri sablo-vilaĝ-arbar-kulturado.

S-ro Basilo Averink, buĉ., 3 Bakald., N30, Astrahanj, Rusujo: L., p.m., gaz.

S-ro Nikolao Ŝaŝkin, Cistije prudi (apud Poŝtamo) d N 9, kv. N 6, Moskvo, Russia kun ĉiuj landoj pri agrikulturo, socialismo, k. a.—deziras ricevi helpon per provizajoj, semoj, vestaĵoj, kaj diversaj objektoj; reendas kolektojn de P. I., gazetoj, jurnalaj, libroj, kaj kion oni deziras.

D-ro Bogopolski, Ruslando, Astrahan, Poĉto-vaia ulica. Travenotologiceskij instituto.

THE WRITER'S MONTHLY

Edited by J. Berg Esenwein

A magazine of real help for those who write. Carolyn Wells says:

"The best magazine of its kind because it is practical."

Single copies 15 cents . . . \$1.50 a year

THE WRITER'S MONTHLY, Dept. A
Springfield, Mass., U. S. A.

ATTENTION! ESPERANTISTS!

The LLANO PUBLICATIONS

record the doings of the Llano Co-operative Colony in Louisiana. This group of co-operators are using Esperanto largely and aim to use it in their every day work. It is probably the only community of its kind. Children are taught Esperanto in the High school course. They are also co-operating in the production and distribution of the necessities of life. They have a beautiful social life in a healthy happy community. Write for literature and ask for a sample copy free.

LLANO CO-OPERATIVE COLONY

Leesville, Louisiana.

S-ro T. Tosnovikov, Sovetskaja St., Sarapul, Perm, Rusujo, petas Esperantajn librojn novajn aŭ malnovajn, serĉas eldonistojn de rusaj lernolibroj.

Malnova Esp-isto el Peterburgo, viktimo de bolŝevikoj plezure korespondos kun spertaj samideanoj el Usono, kiuj povus konatigi lin kun socia, literatura, ktp. vivo en Usono. Roman Sakowicz, Zienna 31 m. 4, Warszawa, Polio.

Doktoro A. Vinnik, Ruslando, Astrahan, Beogorodskaja ul., 6, pri medicino kaj ĝia progreso. Precipe kun doktoroj kaj studentoj de medika fakultato. i.p.k., L.